nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2011

## ALVENAS LA ZAMENHOF-TAGO

La 18-an de decembro madridaj liceanoj celebros la tradician Zamenhof-feston. Kiel pasintjare, ni kunvenos en la ludoklubo *Da2* (Strato San Luciano 4, Villaverde, tre proksime al metrostacio Ciudad de los Ángeles: vidu apudan mapon) por disvolvi distran kaj kulturan programon, kaj por kunmanĝi. La manĝado estos memserva: ĉiu alportu iun manĝaĵon aŭ trinkaĵon, plus diversajn manĝilarojn. Ni komencos je la 12-a matene, kaj jen la provizora programo:

12:00 Alveno + dismetado de E-flagoj. Bonvenigado.

12:15 Disdonado de diplomoj al la lernantoj de la lasta ĉeesta kurso.

12:30 Jorge Camacho prezentas sian laste eldonitan poemaron




13:00 Miguel Fernández legas poemojn

13:30 Filmo "Stranga Nupto" (amatoraĵo far MEL-anoj ĉ. 1983)

14:30 Kunmanĝado + babilado

15:45 Purigado

16:00 Prezento de la venonta Hispana Kongreso en Almagro kaj de la projekto por festado de la 125a datreveno de la lingvo Esperanto.

16:15 Filmo

17:00 Kvaropo Sinkopo

18:00 Ordigado de la ejo + adiaŭo

Poste, oni proponis ke tiuj kun iom pli da tempo, povos kune spekti ĥorkantadon en ekstera preĝejo. Ekzistas du eblecoj: ĥoro *Verda Stelo* kantos en San Francisco el Grande, je la 20:30, kaj Grupo Vocal Siglo XXI (ĥoro en kiu membras nia samasociano Manolo Pancorbo) en preĝejo San Martín (strato Desengaño 26), je la 20:00

Krome, dum la tago estos organizata Libroservo, kiun prizorgos Pedro Sanz (SATeH).

Notu ke temas pri provizora programo. Se vi deziras proponi aktivadojn, bv. kontakti Liceon ĉe saluton@wanadoo.es. Krome, la programo estos ŝanĝebla surloke, laŭ plaĉo de ĉeestantoj.

## 71a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La venontjara Hispana Kongreso de Esperanto okazos de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo en la manĉa urbo Almagro.

La ĉefa sidejo de la kongreso estos la Palaco de la Grafo de Valdeparaíso, konstruaĵo el la 18a jarcento, nuntempe kulturejo de la provinca deputitejo de Ciudad Real. Ĝi disponas pri ĉiuj necesaĵoj por la okazigo de la kongreso: salonoj, kunvenĉambroj, ripozejoj kaj ankaŭ loĝebleco.

Almagro estas tre alloga urbeto, kiu posedas pitoreskan historian centron kaj multajn artajn metiejojn, kaj estas ofta vizitcelo de turistoj. Ĝi estas referenco de la teatra kaj kultura medioj de la regiono pro sia Internacia Festivalo pri Teatro kaj Kulturaj kaj Turismaj Aktivaĵoj.

La organiza komitato nun pretigas programon, kiun oni konkretigos en venontaj informoj. Antaŭvidataj estas teatraj prezentadoj, prelegoj, distraĵoj kaj vizitoj. Ni ankaŭ festos la 125-an datrevenon de la lingvo Esperanto. Parto de la kulturaj programeroj fokusiĝos sur la celebrado de la 20-a datreveno de la firmiĝo de la Ibera Skolo de literaturo en Esperanto. Ni atendas la partoprenon de bona parto de tiu verkista grupo. Ne mankos turismaj programeroj.

**nia voĉo** **decembro 2011**

## 125 JAROJ DE NIA LINGVO

Dum 2012 ni festos la 125an datrevenon de la publikigo de la Unua Libro de Esperanto. HEF nun pretigas projekton por celebri la datrevenon, kaj interne kaj por la neesperantista mondo. La projekto ankoraŭ ne estas tute difinita, sed dum la zamenhofa tago oni anoncos la ĉefajn programerojn kiujn oni ĝis nun pretigas.

Se vi havas planojn, ideojn, aŭ se vi simple volas kunlabori en la efektivigo de la agadoj por disvastigi la lingvon, ĉiu helpo estos bonvena. Petu aliĝon al la retlisto de aktivuloj de HEF, en http://es.groups.yahoo.com/group/hefaktivado/

## NOVAJ KURSOJ DE ESPERANTO

Pedro Hernández anoncis novajn kursojn de Esperanto por la venonta jaro.


Kurso de Esperanto por komencantoj komenciĝos la 28an de januaro kaj daŭros tri monatojn, kun klasoj de du horoj, ĉiusabate. Eblas akiri la materialon pere de la grupo esperantovallekas, kiun eblas aliĝi per adreso esperantovallekas-subscribe@yahoogroups.com. La prezo estas 20€.

Perfektiga kurso komenciĝos la 8an de januaro. Ĝi funkcios per neĉeesta metodo, kun individua laboro kiun gvidos Pedro. Estas antaŭvidataj ekzercoj de skriba kaj parola komprenado, kaj ankaŭ de sinesprimado, ĉu skriba, ĉu parola per la partopreno en surlokaj babiladoj. La prezo estas 20 eŭroj kaj la nombro de lernantoj estas limigita (ĝis maksimume 10-15)

Pliajn informojn eblas akiri en la spaco http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid.

## SOLIDARA AGADO

En la apuda foto eblas vidi la sunpanelojn kaj la ceteran materialon utiligatan por elektrizi kamparan dispensarion en Tanzanio, danke al la helpo entreprenita de nia samideano Manolo Parra, en kontakto kun la loka esperantisto Mramba Simba. La teksto diras: “Koran dankon, esperantistoj de Madrid”




## MADRIDA PROGRAMO

La kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la grupo.

Pro la speciala kalendaro, en decembro ne okazos babilrondo en kafejo, kaj ni koncentriĝos al la Zam-festo. Krome, konkretiĝas jam la kalendaro por la unuaj monatoj de la venonta jaro.

- 16-a de januaro, en sidejo de MEL: “Libio antaŭ la milito”, Carmen Suárez.
- 20-a de januaro: 2-hora vizito tra la kvartaloj Santiago kaj San Ginés de urbo Madrido.

Oni ankaŭ planas montaran ekskurson, kun ĉirkaŭiro al monto Bañaderos, sen aliri ĝian supron. Probable je la 18a de marto (konfirmota).

Pri aliaj novaĵoj en Madrido kaj la mondo, atentu la diskonigojn en la retforumo pri Esperanto en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com